



DUMONATA KULTURA INFORMILO KAJ ESPRIMILO

Redaktejo : Esperanto, F 47470 BEAUVILLE


Abono en Eŭropo : 60 FF. Ekstereŭrope : 80 FF

Speciala abono por nepagipovaj landoj : 40 FF

Ĝiri al : CERCLE AMICAL ESPERANTISTE AGENAIS

P&K : 3371 74 M Bordeaux (mencii same sur bankĉekoj!)


ATENTU!!



Ĉu Esperantaj
(kaj esperantaj?)
diktatoroj ?

Kiam juna, mi estis optimisma kaj naiva kredi, ke la lernado kaj uzo de Esperanto ŝanĝos nin pli bonaj, pli demokrataj, pli homamaj homoj. Mi intertempe ekkonsciis, ke tio ne okazas, aŭ nur malmultege, aŭ eble en nur tre maloftaj kazoj.

Ja interagante kun la Esperantistaro kaj observante ĝin, kaj min mem, mi konstatis ke la Esperantistoj havas la samajn karakterojn kiel la ne-Esperantistoj, kaj agas same. Ĉiajn ecojn oni trovas en ili, kaj se kelkaj el ili estus en fekundaj cirkonstancoj, ili povus fariĝi iuj ajn "herooj" kiaj priskribiĝas en la literaturo kaj en la historio. Se ĝenerale la Esperantistaro ŝajnas pli milda, pli demokrata, kaj pli helpema ol la resto, la ne-Esperantistaro, estas pro tio ke ĝenerale nur tiaj homoj lernas Esperanton.




Unu el tiuj ecoj trovigantaj inter Eŝperantistoj preskaŭ samgrade kiel inter ne-Eŝperantistoj estas la diktatoretemo. Mi diras diktatoretemo, ne diktatoremo, kvankam kelkaj el ni, se en fekundaj cirkonstancoj, ne malfacile ŝanĝiĝus al dik-

tatoroj.

La diktatoretemo manifestiĝas nur malmulte en organizaj situacioj, kvankam ĝi tie ne tute mankas (asociestroj, Akademianoj, kto). Ĝi montriĝas pli sur la lingvisma tereno. Same kiel en la ĝenerala vivo ekzistas homoj kiuj deziras devigi onin ne fumi (ne mi fumas), ne samseksumi (ne mi tielas), ne simortiĝi, ne salajrati same kiom ili, ne aborti, ne manĝi porkaĵon, ne blasfemi, same tiel ekzistas Eŝperantistoj kiuj deziras devigi onin uzi ilian lingvostilon aŭ neuzi certajn de ili ne ametatajn Eŝperantaĵojn.

Tiel ekzemple aperas Eŝperantisto, kiu diktatorete ne respondas onian leteron, se oni alparolas lin per la oficiala vorto "ci". Tiel aperas Eŝperantistino kiu klōpodas devigi Eŝperantajn gazetojn (cenzuro?) ne akcepti artikolojn en kiuj troviĝas Eŝperanto-formoj kiujn ŝi malametas ĉar ŝi aŭ ne komprenas ilin aŭ ĉar malmultaj personoj uzas ilin. Tiel aperas Akademiano kiu rifuzis min viziti lin (en Eŭropo) ĉar mi petole kritikis iun strangan (nesciencan) teorion lingvisman lian ("beleco" de certaj vortoj). Tiel aperas alia Akademiano, kiu pro sia grava pozicio ridindiĝas onin ĉar oni ne rajtas malsamopinii kun liaj misideoj lingvismaj. Tiel aperis tria Akademiano, kiu lingvisme estas nekompetenta kaj proe (= pro tio) diktas, ke mi ne rajtas uzi en Eŝperanto certajn Fundament'ecajn formojn (memstarajn sufiksojn) kaj kiu malvere sugestias, ke mi kopias alian Eŝperantologon. Tiel



aperas redaktisto de demokrat-eca Eŝperanto-asocio, kiu maldemokrate diktas, ke certajn Fundament'ecajn vortojn (memstarajn sufiksojn) li rifuzas presigi en miaj artikoloj ĉar iu Akademiano nekompetenta informis lin kaj ke tiu Akademiano estas lia Mastro (lia diktatoro?) en lingvaj aferoj (kiujn nek li komprenas). Tiel aperis la granda Kalocsay, kiu preskaŭ "mortiĝis"

min (nur letere) ĉar mi ne samopiniis kun li pri io. Tiel aperas mi, kiu fanatikete uzas nur oficialajn Eŝperantajn vortojn kaj neniam neologismojn (se ne novaj inventoj), por sekvi la lingvan spiriton de Zamenhof. Tiel aperas eks-Akademiano, kiu pensas esti dio kaj postulas ke oni akceptu kaj uzu nur liajn neologismojn (pri sporto, ktp). Tiel aperis pluraj aliaj, kiuj pro sia memfido kaj socia stato deziris devigi min kaj aliajn obei iliajn ideojn pri Eŝperantaĵoj, pri neuzendo de certaj Eŝperantaj formoj, kaj pri proponitaj "plibonigoj" kaj ŝanĝoj de Eŝperanto.

Ĉu Eŝperanto plibonigas nin ?

Marcelo Leereveld.

Rolando LEVREAUD

Abrupte falis la dolora novaĵo : mortis Rolando LEVREAUD.

Aliaj pli kompetentaj diros pri la gravega perdo por SAT en Francio kaj por la franclingva eŝperantistaro sur la pedagogia kampo. Mi volas nur elvoki la memoron pri tiu afabla bonega kamarado.

Nur trifoje mi lin renkontis, nome : en 1966 en lia hejmo en Saint-André-de-Cubzac ; en 79 en Avinjono okaze de SAT-Amikara Kongreso ; pli freŝdate en Nimo, kie li kun la edzino vizitis nin. Malgraŭ sia griza barbo li aspektis juna, vigla, sana. Mia edzino admiris, kiel flue kaj elegante li parolis la lingvon internacian. Ŝi diris : "Lin aŭdante mi pli bone komprenas Eŝperanton, kaj mi konscias pri ĝia belsoneco."

Tia estis efektive nia lingvo parolata de li per sia beltembra voĉo.

En nia memoro Rolando LEVREAUD konservos apartan lokon.

VALO.

Pri Henriko CASTIAU

Antaŭ kelkaj tagoj, mi aŭdis pri la morto de mia amiko Henriko Castiau. De pluraj jaroj nun, nia korespondado iom post iom evoluis al filozofiaj temoj : la vivo, la feliĉo, la morto, la saĝo, la spirita vivo... Mi bezonis lian trankvilan, patrecan optimismon, lian entuziasmon al simpla vivo, kaj lian pretecon rakonti siajn pasintajn spertojn por prilumi la nuntempon.

En la lastaj paĝoj de la lasta numero de **Laŭte**, kiun mi ricevis (n-ro 96), mi mirante legis artikolon pri "ĉu ekzistas vojo al feliĉo?". Se mi relegas tiun artikolon nun, aŭdinte pri lia morto, ĝi prenas plian signifon. Mi legas : "La morton mi tute ne timas (...). Mi scias ke mi plenumis la taskon kiun la naturo postulis de mi...". Mi kredas je Dio ; mi havas neniun religion. Same li ja rifuzis ĉiujn religiojn, sed mi certas, ke li diris "naturo" precize samsignife kiel mi diras "Dio". Krom tiu vorto, mi, per mia tuta animo asertas la saman frazon. Sed, ĉar mi estas pli juna ol li, mi diras : "La morton mi ne timas. Mi tamen esperas, ke mi havos la tempon plenumi la taskon kiun Dio postulis de mi."

Kiel bedaŭri la morton de amiko, kiam oni konscias, ke li mortis feliĉa ? Ĉu mi rajtas egoisme plendi, ke li ne plu babilos kun mi, nek skribos al mi, nek sendos tradukotajn tekstojn al mi, nek kunpartoprenos staĝojn ? Li daŭre plu vivas apud mi, per siaj leteroj, artikoloj, tradukoj, per miaj memoroj, kaj per la spuroj kiujn li lasis sur miaj pensoj kaj la vivoj de siaj familianoj.

Muta Mevo.

Intensaj Esperanto-kursoj semajnfinaj

aranĝitaj de ESPERANTO 44 (regiono de Nantes, Francio) okazos la 6an kaj 7an de februaro en Nantes kaj la 29an, 30an kaj 31an de majo en Le Pouliguen (apud La Baule). Informojn kaj aliĝilojn peti de : Janine VINCE, "Hejme" Rue du Docteur Bichat, F 44600 SAINT NAZAIRE



ĉies

VIDPUNKTOJ

Pri "**Mi estas nova legantino de Laŭte**"

(Laŭte n-ro 99)

Tiu artikolo enhavas mirigan proponon "Eŭropik" fare de esperantisto ?! Per ĝi, Esperanto fariĝus kvazaŭ naciaj esperantlingvoj... do ne neŭtrala mondlingvo... plimultigus la naciajn lingvojn, kaj la vortelemeton "esperant" oni forigu...

Suzanne

SINJORO BORVO...

(Tiu artikolo alvenis post la apero de L102. Red.)

Sinjoro Borvo,

Peti pardonon mi devas, se mi tiom ŝokis vin. Sed ŝajnas ke vi tro rapide legis mian skribaĵon kaj ne komprenis ĝin.

Nenie mi estis akuzanta "anglosaksojn". Mi klare skribis pri la "usonangla" lingvo vehiklanta monavidecon. Verŝajne pro tio ĝi estis rapide adoptita de "komercistoj, ŝtelistoj kaj banditoj".

Neniam mi akuzis anglajn parolantojn. Estus tro facile! Se la angla estis adoptita de tiuj malhonestuloj, tio tute ne signifas ke ĉiuj parolantoj de la angla estas "gangsteroj", eĉ usonanoj. Ne tiom rapide ĝeneraligu kaj ne jezuite interpretu miajn vortojn kiel vi eble estas pensanta.

Vi estas nek honesta nek sincera ! Kiam vi redaktis vian "provokaĵon", vi certe ne estis prognozanta la lavangon da protestoj kaj malaprobaj aperontaj en tiuj numeroj de L!

Viaj kvar jaroj da praktikado ne permesas al vi longe argumenti. Vi ne rajtas nei cent jarojn da ekzistado. Ĉu via juneco ne permesas toleri maljunulojn ?

Humile mi memorigos al vi, ke ĉiuj tiuj maljunuloj kiujn vi renkontis kaj ankoraŭ renkontos, estis junaj siatempe, sen blankaj haroj, kaj tiel viglaj kiel vi mem hodiaŭ. Nur la junuloj kapablas anstataŭi tiujn maljunulojn. Do ne mal-kuraĝigu ilin !

Ni ne bezonas novan ideologion sed junajn fortojn tenontajn firme kaj alte nian verdan standardon. Ni daŭr-

igos nian batalon por la monda paco per la nura efika armilo, kiun ni posedas : la internacia lingvo de iu Doktoro Esperanto.

Se al vi ne plaĉas nia idealo, vi restu komercisto aŭ rabisto, laŭvole ! Ne sufiĉas sin kaŝi malantaŭ "o"-finaĵo por esti esperantisto, necesas ankaŭ iom da fido kaj da tiu revo, kiun la maljunuloj plu konservas de sia juneco.

Modesto.

Reage al s-ro Patriko (L:102, p.42)

S-ro Patriko aperigis "novajn" malnovgajn argumentojn kontraŭ Esperanto. Kaj inter ili estas ĉifĉifonigita argumentaĉo pri artefariteco de la lingvo kiel kialo de ĝia fiasko. Tiu argumento estis jam multfoje kritikita dum la vivo de Esperanto kaj al mi ŝajnas, ke okaze sufiĉas aperigi la fablon de la soveta esperantisto N. Danovskij.

TELEFONO (fablo)

Ekblekis Azeno kaj ŝtono,
 ĉe la veno tio baros eblecon
 al Pitono : inventi pli perfektan specon.
 - Kia estas via Sed la ĉefa rezono :
 opinio ja telefono
 pri telefono ? estas artefarita lang'o,
 - Tutdefinitiva : sen karno, sen sango.
 negativa ! Kaj al mia naturo
 - Kial tia respondo ? abomenas manufakturo !
 - Memklare ! Kun solena mieno
 Se la mondo foriris Azeno,
 ektelefonos universale, fiera pri iniciativo
 tio estas fatale kaj klara perspektivo.
 danĝera Por kompreno
 al parolo senpera. de Azeno
 Krome la ĉikan' de Serpento
 se nuna telefono estas argumento
 estos sub ĉiu arbo

N. Danovskij

Igorj (Ruslando)

BRŬŬUROJ DISPONEBLAJ ĈE SAT-BRŬŬURSERVO
 Adreso : Cercle amical esp rantiste F-47470 BEAUVILLE
 P  : 3371 74M Bordeaux; samadrese

Mendkado. T�toloj (A�toroj)	Prezo en FF
Aa. La artuvenantoj de Anarkismo (Armand)	4
AA. La Aperoĵ de Anasveno (Han Riber)	30
AL. Atvokoj al la homa konscienco (APJR)	10
ALT*. Al la tero retume (Ledon)	40
AN. Nia angorplena socio (Milton Ŝimeŝka)	3
AP. Amo per provinĵoj (Azevedo)	2
AT. Kiel mi estas ateisto (A-Lonulot, tr. Valo)	30
AU. Al unu lingvo por E�ropo (Fettes)	5
BA. Bazo de Anarkismo (B�lkarski)	25
BP. Legendo pri la bela Pekopano (V.Hugo)	15
B�. La racia kaj ateista budhismo	5
�. Ekologio : aŭ ideologio ? (W. Gunther)	3
CM. Civila Malobemo (H.D.Thoreau)	10
�S. �u socialismo konstruiĝas en Sovetio ? (Lanti)	8
DI. Kiel diri...? (Lentaigne), E-frazologio	30
EL. Elektio de tekstoj de Bakunin	10
ES. Por ekologia socio (Muray Bookchin)	15
ET. Etiko I (Kropotkin)	15
EV. Eduko kaj vilsignifio (Krishnamurti)	7
FA. Konstrui fajron (Jack London) romano	5
FE. Espiritaro Franca-Esperanto (Bourgois)	50
FF. La Forto de la Fortaj (Jack London)	5
FI. La fluo de linterparolo (Bourgois) Esp./Fr.	10
FP. Faux amis. Faux parents et "strangers"	15
FV. Fonte al la vivo k.a. tekstoj (Krishnamurti)	10
FZ. Filozofio Zoologia (Lamarck)	25
HO*. La Evangelio de la Horo (Berthelot)	10
IE. Initiation a l'Esperanto (An Kaj�)	5
IM. Individualista Manlibreto (Han Riber)	5
IN. Individualisma socialismo de A.R. Protschowsky	2
JA. Jaro 2000 (H.Muller) disdona ekonomio	35
KA. Kancero kaj Ekologio (Maurice Touchais)	15
KB. Kie brulas, ĝentilmanoj? (poemaro) Buchowski	18
KE. La Kvinna Evangelio (Han Riber)	25
KI. El la kara infaneco... (Valo)	20
KP. Katastrofiano pri Fessenheim-atomecentra	20
KV. Kvardek pa�oj al plua posedo (Lentaigne)	5
LA. Lingvaj anguloj (Baromet)	10
	25

Por mendo minimume 120-franka, afranko inkluzivitas. Se ne, aldoni 20 % !

LEK. La eta koto kiu ne volis morti (por infanoj)	5
LK. La Konfliktio (Le Dantek) + Dubi (Alain) tr-Lanti	25
LL. Leteroj de Lanti (gis 1937)	50
LM. Le Mondo ne havas atendejon (Dekker)	20
LN. Linguistique et non-violence (H.Masson)	3
LR. La Ribelo (Joseph Roth) romano	20
ME. La Mistero de nia surtera vivo (Archdeacon)	5
MM. Migrante tra Metioj (Valo) aŭtobiografio	25
MN. �u militista defendo estas kredinda? (Lasserre)	6
MS. Memvola Servuto (La Bo�tie)	5
MV. Mia vivo. Artikolaro. Poemaro (Bartelmes)	15
NC. Naclismo (Lanti)	12
NI. Nia Individualismo (E. Armand)	6
NL. Naturlego, pensolego, morala lego (Leo Polak)	3
NO. Nova Paradigmo en Psikologio (Feidman)	35
NT. Ne tiel, sed tiel �i! (Faulhaber)	15
PA. Pensoj de PASKALO (ekstraktoj)	15
PF. Proverbaro Franca/Esp. (Bourgois)	20
PL. Esperanto kaj Literaturo (R.Laval)	5
PN. Politika Neperforto (M.A.N.)	8
PR. La Poemo de Rodano (Frederi Mistral)	30
PS. Psiktotransformismo (Ergoto de Bonverno)	5
RO. Rompoj (A.Jacquard)	5
SE*. Sennaciece tra nia mondo (G.R.Ledon)	5
SR. Les 16 r�gles comment�es (R.Laval)	60
SS. Shadkatismo. Sovetioj (A.Pannekoek)	3
SG. Lu Stora Gasto (Michel Due Gombaz) (teatraĵo)	5
TC. Por tutmonda civitismo (A.Guyman-Rollet)	20
TD. Tiel diri! (Lentaigne) supl. de DI por francoj	30
TM. Tra la mondo per biciklo kaj esp. (Beratre)	25
TP. La Turo de l' Popoloj (Han Riber) romano	30
UN. Unu aŭ Nil (Guy Marchand) Mondcivilitanismo	30
US. Urueco super prokreda dividiĝo (Leo Polak)	3
VH. �u ni vere helpas la trian mondon? (Roberts)	15
VI. Verkoj de Lanti I. (Por la Neŭtrulismo!)	15
La Laborista Esperantismo. Absolutismo.	
Herzulo. Herezaĵo. Adarnaĵoj)	40
V2. Verkoj de Lanti 2. (3 semajnojn en Rusio	
Tro Plena Gramatiko, Diskutoj, Epiloge)	30
V3. Verkoj de Lanti 3. (Artikoloj, paroloj kaj	
ekstraktoj el leteroj de 1937 gis 1946)	30
VO. Vortoj de Kamradato E. Lanti	30
VT. El verkoj de Leo Tolstoj (Patriotismo kaj	
registaro, Al politikistoj, Ĥodinka, Ne mortigu!)	20
ZH. Tra Zamenhofa Hereditaĵo (A. Crnich)	10

RIMARKETO pri artikolo de R. GRZELA (L!102, p.57)

R. Grzela deklaras, ke Pollando estas "naskiĝlando de Esperanto". Sed de historia vidpunkto oni devas demandi, ĉu en 1887 ekzistis la ŝtato Pollando. Sciate estas, ke ne. La nuna Pollando ne estis tiam memstara ŝtato, ĝi estis nur parto de Ruslanda Imperio, kaj L.L. Zamenhof estis ĝia civitano. Tiukuntekste la vortoj "Pollando estas naskiĝlando de Esperanto" subkomprenigas, ke Esperanto estis frukto de polaj kulturo, mensostato, spirita vivo. Sed ankaŭ ne tiel estis - Esperanto aperis ne danke al, sed spite al naciismaj sentoj (polaj, judaj k.s.), kiuj caris tiam en tiu parto de la Rusia Imperio. Simile, kosmodromo Bajkonuro troviĝas nun en ŝtato Kazaĥstano, sed neniu ja diras, ke Kazaĥstano estas naskiĝlando de hompilotaj kosmaj flugadoj. Finfine, ĉu tre gravas, en kies teritorio naskiĝis Esperanto? En planedo Tero ĝi naskiĝis.

Igorj (Ruslando)

KIEL PACIGI URBEGOJN (aldono al la debato en L!102)

Urbo havas du flankojn: la materia flanko (hardware) estas ligita kun la latina radiko "urbs" de kie venas "urbo". La nemateria (software) kun la radiko "civis", el kiu fontas "civitano" aŭ "civilizacio".

Se oni observas la teron elde alia planedo, oni konstatas, ke en iuj regionoj la denso de la loĝantaro malrapide kreskas: tio estas, larĝasence, la kamparo. Male, ĉirkaŭ kelkaj punktoj la homoj amase grupiĝas en konstruaĵoj pli kaj pli altaj.

Ankaŭ se oni observas la loĝantojn tra la epokoj, oni konstatas, ke en la kamparaj regionoj la socia vivo ne multe ŝanĝiĝis: ĉiu konas persone siajn najbarojn, havas teritorion, kaj obeas al konatoj - tribestro aŭ ĝendarmo.

En urboj, aferoj iĝas pli anonimaj kaj abstraktaj: la divido de la teritorio estas pli subtila kaj postulas malsimplajn ilojn, ekz. ŝlosilojn, kreditkartojn, transportkartojn, sekretajn kodojn, ktp. Oni devas obei, ne al iu videbla homo, sed al abstrakta afero: Leĝo. Ankaŭ la propraĵo iĝas io strange abstrakta: la radioaparato, kiun junulo ŝtelas

el ĉiovendejo, apartenas ne al la gardisto, sed al ulo, kiu neniam vidis ĝin kaj eĉ ne scias, ke li posedas ĝin.

En la kamparo, homoj havas lokon por moviĝi aŭ kuri, povas laŭte paroli aŭ alvoki iun, ĵeti rubojn en angulon, sin lavi nur malofte, kraĉi aŭ eĉ kvereli sen tro ĝeni la aliajn. En urboj, tio tute ne eblas.

La urba homo devas konsenti, ke li turnu siajn emociojn: atakemon, ĝojon, dezirojn aŭ impulsojn al si mem, eĉ se tio streĉas lin. Tio estas la prezo de la enurba vivo.

La ĉirkaŭurbo estas miksaĵo de urbo kaj kamparo. Ekzistas riĉaj ĉirkaŭurboj, kie homoj vivas urbe sur kampara spaco. Tie homoj plejofte enuas. Ekzistas ankaŭ malriĉaj ĉirkaŭurboj, kie oni amasiĝas homojn, al kiuj mankas sperto pri la enurba vivmaniero, kaj kiuj ne tuj komprenas, ke la vivo en urbo postulas, ke ili rezignu pri grandega parto de sia libereco.

Bedaŭrinde, publika debato pri tiuj temoj ne eblas, ĉar la homa sinteno estas nun tabua temo, tial la plejmulto preferas, kiam eblas, iri loĝi aliloke, ol atendi solvon kiu ne tuj venos.

Mi proponas estontan debaton en L! "Kiel sentabuiĝi tabuajn temojn?"

Janseb

RENKONTO EN FEBRUARO

Kunmiksita grupo el ĉ. 35 gelernantoj en la aĝo de 16-19 jaroj kun 3 instruistoj de Vestfalujo partoprenis je semajnfina seminario pri la temo "malamo kontraŭ eksterlandanoj". Tiu seminario estis organizita de la "politika laborgrupo je lernejoj", kiu okazis komence de februaro '92 en la Saŭerlanda Gumersbaŭo. I.a. mi havis vesperan trinkrenkonton kun seminarioestro Aŝimo, 22-jara (sed aspektis kiel 35-), studanto de pedagogio, kiu havis kiel pliajn interesojn filozofion kaj motorbicikladon. Aŝimo al mi klarigis la - menciitan en la seminarhoroj - fakesprimon "politika ekstremismo de la mezo".

"Extrema" signifas "ekster la mezo", do en politiko agadojn, kiuj ne nur ne pretas savi la konstitucion kun la Libereco-Demokrata Bazo, sed eĉ ĝin damaĝas. Ekzemple ekzistas maldekstraj kaj dekstraj ekstremistoj. Sed tre pli danĝera estas laŭ la Aŝima opinio la ekstremismo de la mezo, ĉar al ĝi apartenas ĉ. 80 % de la loĝantaro. Sen esti ekstreme mal-

dekstraj aŭ dekstraj, ankaŭ tiuj ekstremistoj estas pensantaj pasive je aŭ eĉ kontraŭ la konstitucio. Ekzemple, se atomenergigejo estas planita stari tute apud la domoj en ia komunumo, tiam estas alta la volo manifestacii kontraŭ la konstruo. Sed se tiu ĉi energigejo staras ie alie, tiam neniu el tiu ĉi komunumo maltrankviliĝus pro ĝi. Mi demandas Aŝimo : Sed se la konformismo ne plu estas praktikebla, ĉar oni ekzemple estas persekutata je rasaj aŭ etnaj kialoj? Aŝimo : Tiam la ekstremisto de la mezo flugas al plua arbo, dum la antaŭa forbrulas. Sed se tiu ne apartenas al persekutata grupo, ekz-e dum nazi-reĝimo, tia ne tuŝas tiun. Iel ajn, pretaj por politika agemo estas maksimume nur 20 % de la homoj.

Mi ne volas tro simple transpreni la fakesprimon "ekstremismo de la mezo", sed pripensu jenan ekzemplon : Je enketoj jen 60 %, jen 80 % de la balotrajtuloj en Germanujo jesas utilon de la mortpuno, kvankam la Germania konstitucio ĝin eĉ dufoje malpermesas. Tamen la voko de nov-naziuloj pri mortpuno (ekz-e en rilato kun murdo al policisto) iras en multajn malfermajn orelojn.

Sed do ekzistas ankaŭ multaj, kiuj politikas je pura profiligemo, mi demandas Aŝimon. - Certe! - Ĉu li povas sin mem opiniĝi neekstremisto laŭ tiu difino? - Ne, je tio neniu povas esti certa. Ĝenerala neigo de ia altruismo, de senmema sindono, nenion vere ekskludas de la ekstremismo de la mezo.

Aŝimo rakontis al mi ankaŭ pri "ŝokseminario", semajna seminario, kiun li partoprenis kiel finklasa lernanto. La seminarianoj estis plejparte jam agantaj en la "Gelernanta Kunadministracio". Multaj estis ankaŭ membroj en politikaj junulorganizoj, ekz-e Aŝimo estas membro de Junaj Socialistoj, Aŝimo rakontis : Ni ĉiuj opiniis nin la avangardo de la avangardo. "En du semajnoj mi povas ŝanĝi la mondon!" Maturaj civitanoj.

La unuan tagon oni sin okupis pri la titolo de la seminario : "Politikaj bazoj". La duan tagon diris la seminariestro : "Mi nun estas marksisto-leninisto. Provu persvadi min pri alia koncepto!". Tion rigardis la geknaboj komence kiel ne tro malfacila, sed la seminariestro povis defendi sin kontraŭ ĉiu kritikpunkto. La provoj de la seminarianoj estis tute senefikaj. Kaj je la fino de la tago nenio restis de tio : ĉiuj nun devus esti persvaditaj marksistoj-leninistoj. Ili havis en ventro la strangan senton, ke iel tio ja ne povus esti vera, sed ili simple ne trovis la angulpunkton. Do neniel "maturaj civitanoj" kaj tio! Vi scias nenion! Aŝimo : Ni staris antaŭ la kolektiva suicido.

La specialaĵo de la seminario estis : Sur la programlisto ne estis precizaj tempindikoj! Je la plujaj tagoj post tiu dua estis sur programo speciale

ekzercadoj pri pensado kaj retoriko. Plurajn horojn. Plej frue je la 23a la labortago estis finata, maksimume estis je la 3a matene. Tagmeza paŭzo por manĝi estis nur unuhora. Aŝimo : Ni reale glitis sub la tablojn, fizike tute lacegaj.

Aŝimo : Poste - certe danke al tiuj ekzercoj - mi trovis la angulpunkton (i.e. pri marksismo-leninismo). Sed antaŭ alio, ni nin demandis, kion Gelernanta Kunadministracio fakte povas fari. Niajn celojn ni starigis ĉiam tre mallonge, ĉiam konkrete pridemanditaj kaj bazitaj. Post tio ni povis pli kaj pli ete kaj tre realkonscie pligrandigi la celojn. Cetere, vespere ni kuis trinkante kaj diskutis pri la angulpunkto de la marksismo. Ĉu kun JuLoj (Junaj Liberaluloj) aŭ kun iuj de la J.U. (Juna Unio = konservativa partio) - strange, ke mi ankaŭ aŭ ĵus bone min komprenis kun tiuj, kiuj ne kiel mi estis ĉe la JuSoj. Sed la angulpunkton tiam ankoraŭ ne trovis. Mi demandis Aŝimon, ĉu oni sin povus savi kontraŭ tio, ekz-e per religia pieco. - Ne. Tion li (la seminariestro) faris tiom inteligente kun lojalaj kaj mallojalaj retorikaj rimedoj - vi nenion povis kontraŭ tio. Mi (Aŝimo) diras, ke 99 % de ĉiuj personoj je tio malvenkus. Tiu knabo jen aŭ tiu knabino tie aŭ vi - tion oni simple ne kredas. Ĉu oni ankaŭ povus forigi la strangan senton en ventro, ekz-e per cerblavigo en totalismaj ŝtatoj? Aŝimo jesas. Aŭ per edukado. La vidpunktoj de la eklezioj - ekz-e la seksumneŭrozoj - ja estas apenaŭ forigeblaj.

Aŝimo : Mi pensas, ke je uloj en viaj aĝoj (do inter 16 kaj 19-jaraj) estas jam tre malfacile evoluigi politikan konscion. Mi - pedagogie - komencus jam je ĉ. 7-jaruloj, sed tie jam ree estus la danĝero nescie tro influ la infanojn je la propra opinio. - Ĉu tiu "ŝokseminario", mi demandas, ne povas esti ankaŭ iom danĝera? (La seminariinstituto, kie ni estis, ekz-e havas ok etaĝojn). Aŝimo : Ĝuste tial mi malkonsentas kun tia seminario.

Estas tagoj, kiam oni lernas pli ol dum tutaj semajnoj...

Korbeto

en decembro 1992.

La 48a Kongreso de SAT-Amikaro estiĝos de la 9a ĝis la 13a de aprilo 1993, en Hérouville Saint Clair, apud CAEN, Francio.

Informoj kaj aliĝiloj al : Yves NICOLAS, 17-37 Quartier du Bois, F - 14200 HEROUVILLE SAINT CLAIR.

Kia bela familia festo ! Kio estas pli luma ol la intermitaj lampetoj de la jularbo aŭ la eklumo en la okuloj de la infanetoj, kiuj rigardas ilin ? Kia plezuro elpaki la multkolorajn donacojn lasitajn de la "julpatro", kiu forgesis neniun ! Estas eĉ nova pipo por la avo, al kiu kuracisto malpermesis fumi. Estas skatoloj da ĉokoladaĵoj kaj suker-aĵoj por la avino, kiu sekvas malgrasigan dieton.

Kuirejoj bonodoras el ĉiuj tiuj bonaj pladoj, kiujn oni preparas nur okaze de tiu tago. La dika meleagro aŭ ansero, farĉita, anaso, koko, bruniĝanta en varma bakujo. La kukoj kun sekaj vinberoj, parfumitaj per gustumendaj likvoroj kaj brandoj.

Ĉiuj tiuj plezuroj, ĉirkaŭ tablo kie estas gaja etoso, forgeso de ĉiutagaj zorgoj, finiĝas en ĝojaj kantoj. Estas komplete festo !

Sed kial kaŝi tion en kristnasko ?... Ĉu nur kristanoj rajtas festi tiun tagon ? Ĉu vi forgesis niajn praulojn festintajn jam de jarmiloj, antaŭ ol vi inventis vian religion?..

Ĉu via dio ne ĉiujn amas ? Ĉu ĝi ne estas patro de la ni-gruloj same kiel de la eskimoj ? De la fakuloj kiel de la analfabetoj ? De la kredantoj kiel de la nekredantoj ?

Kial via eklezio atendis jarcentojn antaŭ ol dekreti, ke la Julfestoj estos datreveno de la naskiĝo de via dio ? Ĉu vi pensas tiel forviŝi la antaŭajn generaciojn kaj kredigi al la mondo, ke ĝi estis kreita nur laŭ la kalendaro, la unuan de januaro de nia nuna erao ?..

Vi volas ignori la antaŭajn klopodojn de la homo por plu vivi malgraŭ la malfacilaĵoj de sia evoluo. Vi ne konsideras la jarmilojn da migrado el oriento al okcidento kaj inverse.

Ĉar la Homo ĉiam serĉis la lumon, ĉu direkte al ĝia levigo aŭ al ĝia mallevigo. Ankaŭ kun tiu lumo li estis serĉanta la Veron ! Kial vi volas kaŝi historiajn faktojn per mensogaj legendoj ? Falsi la veraĵon por kredigi viajn imagaĵojn ?

Ĉu vi pensas la Homon ne sufiĉe plenkreska por kompreni ? Ĉu vi estas tiel spirite mizera, ke vi bezonas aneksi la pasintecon de la tuta homaro kaj perforte kredigi viajn mensogojn ?

Kial vi persistas transformi tiun pacan feston en religian ceremonion ? Tiun tagon ni festis jam antaŭ la alveno de via mesio, kiun kelkiuj estas ankoraŭ atendanta !

Kial ombri nian ĝojon per mensogaj asertoj ? Esperantistoj ne povas fariĝi kompliko de via ŝteltrompo kaj agnoski ke Julo ne estas festo de ĉiuj !

Pacon surtere al ĉiuj bonvolemuoj !

Modesto

PREĜI EN ESPERANTO

katolike : meso okazas en Speyer (Germanio) en la lasta dimanĉo de ĉiu dua monato. La venonta okazos en februaro de 1993. Informoj ĉe : pastro Albrecht KRONENBERGER am Wiesbrunnen 29, 6730 NEUSTADT 13

kvakere : se iu deziras esti akceptata en Esperanto ĉe kvakera adorkunveno en Strasburgo (Elzaco, Francio) aŭ en Offenburg (Badenlando, Germanio), li aŭ ŝi turnu sin al : Jacqueline LEPEIX, 82 avenue Jean Jaurès, F 67100 STRASBOURG

PRI FATALECO

Al kiuj demandas sin pri dato de iu venonta mondskala konflikto, mi provas respondi per astrologiaj/astronomiaj elementoj, kiuj ne baziĝas sur horoskopaj konceptoj sed sur ekvilibro/malekvilibro de planedaj pozicioj kaj aspektoj sendepende de ties trairado de la zodiakaj signoj.

Ni eniris ekde '90 krizan periodon kiu plu daŭros ĝis '97. Ene de tiu periodo la plej grava tempospaco kiu naturas ekfari ĉenmiliton estas tiu de marto '93 ĝis januaro '94. Alia periodo, ŝajne malpli densa, venos ĉirkaŭ 2005/2010...

Multaj (Laŭte-legantoj) ne kredas je fataleco kaj tute ne ŝatas profetaĵojn. Do, mi rimarkigas nur ke fatalecon ni mem faras, ne ŝanĝante kion ni povas/devas ŝanĝi. Je tiu vidpunkto, simila la profeto kaj la statistikisto dum la aktualaĵo jam preteriris la plej pesimismajn aŭgurojn.

Oni jam povas senriske aserti, ke tio kion mi amuze nomas "Uropio" (t.e. utopio pri eŭropa unuigo) bedaŭrinde/bonŝance ne efektiviĝos kaj pro debileco tiesa, kaj pro kontraŭstaro de konkurencaj, realaj potencoj, nome Usono (Ameriko) kaj "futureksa Sovetio".

Dua aserto koncernas la de mi nomatan "futureksan Sovetion". La tieaj demokratigo kaj liberaligo estas trompa afero (samkiel la iama perestrojko), kiu celas nur gajnon de potenco en la konkurenco kun/kontraŭ Usono, paradokse plej bona alianculo en tiu procezo. La sovetiaj politikistoj, nur emante al povo kaj privilegioj, ludas kun la fantasmoj de blinda, ŝafa publikopinio, kiu naive kredas je senbatalaj venkoj...

Usono intervenos Eŭropon nur post definitiva frakaso de "Uropio" kaj ĉefe findetruo de la germana ekonomia potenco (same okazos pri Japanio : **Delenda est Carthago** - Endas detruu Kartagon! Red.) La landoj kiuj el Eŭropo daŭre partos al Okcidento iĝos politike dependecaj posedaĵoj de Usona Imperio. La alternativo estas aŭ rusa aŭ usona kaj estos nova Jalta partigo.

La islamaj landoj havos gravan rolon en la tria mondkonflikto (same Israelo) kaj ties influzono konsistigas probable batalkampon de Maŭritanio ĝis Indonezio kaj de Kazahstano ĝis la Hindia Oceano. La situacio en Balkanoj en tiu ĉi jarfino de '92 jam entenas kondiĉojn de globala eksplodo rekte involvonta Albanion, Grekion, Turkion, Bulgarijon, Rusion, Iranon k.s. La "humanitara" interveno de Usono en Somalio estas preparo al tia konflikto (same pri Irako - Kouejto).

Kiel jam dirite, la nervo de la milito estas la ekonomio kaj ni jam atingis etapon en kiu ekonomio nutras sin el milito. La bilanco estos ekonomia : la ĉefaj perdantoj estos la argilpiedaj gigantoj nome Germanio kaj Japanio (Carthago) ; la gajnontoj : Usono kaj Sovetio (Romio). Sed la plimulto jam ĉesis legi...

Patruko.

Pri **Horo-staĝo en Pireneoj** de la 21a ĝis la 28a de februaro '92

Pri **Alvalencia biciklado el Suda Francio** de la 4a ĝis la 23a de julio 93 (Por infanoj kaj aliaj)

Informas JORGOS, F - 09120 ST FELIX RT
Tel. (33) 61 608 683

Vivu l' armeo !

Mi sekvas kun atento la nunajn okazaĵojn en Somalio. Tie, armitaj fortoj de diversaj nacioj intervenas ne por interfrata buĉado, sed por protektado kaj helpado al malsata, malsana popolo. Esperinde, ili ne bezonos uzi siajn potencajn armilojn. Sufiĉos ilin montri por teni for la rabistojn. Tiel la mizeruloj ricevos nutraĵojn kaj kuracilojn, kiuj kruuele mankas al ili. Homoj ne mortos amase, multaj infanoj plu vivos kaj kreskos.

Plej ofte armeo estas lernejo por krimo. Nun kaj tie ĝi fariĝas lernejo por solidaro kaj bonfaro. Ni salutu tiun escepton, kaj ni diru sen ironio : "Vivu l' armeo, kiam ĝi plenumas humanan mision."

VALO.

PRO MEMORO AL LA FALINTOJ

La rakonto de Valo (L:102, p.25) koncerne lian kuzon, instigas min - kiel respondon - sendi la admirindan antaŭparolon de la libro "**Kvar infanterianoj**" de Ernst Johannsen (1929) :

"... Soleca, forlasita mortinto sur la vojo Moreuil-Morivel; bicikliston glutis funelo en Sommo; teritoriisto kun frakasita kranio enmarĉiĝis en la marĉeto de Laon-Glassy; flamĵetisto karbigita; tankistoj; junuloj, kiuj, eĉ mortante, direktis ankoraŭ viajn mitralojn al la foro, en la ebenaĵon...

"Vi ĉiuj, sterniĝintaj sur la kampoj antaŭ Péronne; artilerianoj en Chemin-des-Dames, dispecigitaj per la obusoj, kiuj trafis vin rekte en la bruston; soldatoj de la municiaj marŝantaroj; fantomoj el la veturiloj, kiuj furioze ruliĝadis en tondra bruego... Vi, kiujn la Morto sternis en fosajojn antaŭ Amiens... Vi, kiujn oni retrovis frakasitaj, dispecigitaj, miksitaj kun ĉevaloj, obusoj, fereroj... Vi, la nelacigeblaj, la telefonistoj, interrilataj agentoj, aviadistoj, telegrafistoj, sanitarservistoj... Kamaradoj, kiuj putras en Flandro, en Chemin-des-Dames, en Verdun... Vi ĉiuj, el la orienta fronto, kaj vi, el la okcidenta fronto !

"Vi, la Miloj kaj la Miloj! Kaj la Miloj!... Kaj ci, ci, mia amiko! Ci, pri kiu neniu povas diri kie ci mortis, kiel ci mortis...Ni ne forgesas vin! Ĉar Ni, ni estis viaj kamaradoj."

tradukis kaj sendis: **Suzanne**



Donald J. Harlow
P.O. Box 551
Pinole, CA 94564
Usono
tel. (1 510) 222-0187
CompuServe [72627,2647]

1992.12.21

Laŭte
Esperanto
F 47470 BEAUVILLE
Francio

Estimataj:

Ĉu mi rajtas aldoni kelkajn vortojn al la komentoj de Edmund Grimley Evans pri la "riĉeco" de la "internacia" angla lingvo, kaj pri la komuneco de vortoj en tiu lingvo, en la numero de marto-aprilo 1992?

Kiam oni komisiis min defori kiel acrarneano en Britujo, 1968-1973, tuj je mia alveno oni donis al mi kaj mia edzino liston de proks. 300 komunuzaj vortoj, kiujn ni devus relerni se ni volus efike komunikadi kun la britoj. Se oni supozas, ke en la ĉiutaga parolado oni utiligas proks. 3000 vortojn, tio signifas, ke ni devis relerni 10% el nia vortprovizo por interparoli. Ne estas strange, ke niaj plej intimaj rilatoj kun britoj dum nia kvinjara restado okazis ĝuste kun la britaj esperantistoj...

Lingvaj miskomprenoj kun britoj abundis. Kelkajn tagojn post nia alveno, ni marŝis laŭ la strato serĉante lavejon por vestaĵoj. Mi demandis al sinjorino, "Kie troviĝas *washateria!*" (sufiĉe uzata usona vorto). Ŝi komprenis nek tion nek sinonimon *laundromat*. Fine mi devis uzi klarigan esprimon *self-service laundry* (memserva lavejo).

Kiam ni instalis televidilon kaj mi malŝaltis ĝin, mi tuj trafis kriket-matĉon, el kies parola komentario mi komprenis nur unu vorton el ses. Bonŝance, la postan tagon mi trovis en *Daily Express* klarigon pri la matĉo, el kiu mi povis kompreni unu vorton el kvar. Sed mi devas konfesi, ke laŭ mia kompreno eĉ la meza brito komprenas nenion pri la kriketa terminaro.

Ni havis amikon—vic-lernejestron (*vice-principal* aŭ *assistant headmaster*, depende de la lando)—kiun mi malfacile povis kompreni pro lia jorkŝira deveno. Pli interesa fariĝis nia konversado kiam li unu fojon petis min helpi malmunŝi aŭtomobilon motoron. Evidentiĝis, ke la teknika terminaro pri aŭtomobilado en Usono ege malsamas de tiu en Britio. La britoj ne nur uzas *petrol* por *gas(oline)* kaj *roundabout* por *traffic circle*, por ne mencii *lay-by* por *roadside rest* aŭ *parking bay*, kaj la *hood* fariĝis ial por ili la *bonnet* de la aŭtomobilo, la *trunk* estas ilia *boot*, ili misliterumas la vorton *tire* ("pneŭo", ne "lacigi") kiel *tyre*, la *crankcase* estas la *sump*, kaj la *crankshaft* fariĝas la ridinda *big end*. Finfine ni riparigis lian aŭton, kaj li denove povis atingi la *divided highway*—pardonu, *dual carriageway*.

Usonanoj povas tre facile diri *bloody sod*, ĉar tio signifas por ni nur "sanga torfo", sed por la britoj tiu esprimo estas sakro + obscenaĵo. Aliflanke, la brita *keep your pecker up* (tenu la mentonon alta = estu, kuraĝa) povas esti miskomprenata de usonanoj, por kiuj la *pecker* estas vira seksorgano; kaj mi konas unu usonan verkiston, kiu, biciklante tra Britio antaŭ jaroj, tre feliĉis kiam juna brita biciklantino en gastejo invitis lin *knock me up in the morning* (veku min matene). Ĉar por usonano la esprimo *to knock up* signifas "gravedigi".

Ie mi legis, ke en la Dua Mondmilito okazis iu grava miskompreno inter la usona kaj brita registaroj, kiam la brita registaro insistis *to table a proposal*. Tio signifas, meti la proponon sur la tablon por konsiderado; sed por usonano, la esprimo signifas, ŝovi sub la tablon por eĉiti konsideradon.

Ĉu ne estis G. B. Shaw, kiu klarigis, ke Usono kaj Britio estas "du nacioj apartigitaj de komuna lingvo"?

Samideane salutas vin

Donald J. Harlow

Donald J. HARLOW



EL MIA GALERIO DE PORTRETOJ

II. Amiko Johano

Tiu skatoleto el latuno, kiun mi tenas en la konkavo de mia mano, estas objekto senvalora, sed por mi ĝi estas altvalora, ĉar ĝi apartenis al Johano ROMANET. De li mi havis ankaŭ fotoportreton en noŝtkarta formato: freŝa vizaĝo de adoleskanto, arandaj brunaj okuloj kun observema, profunda, milda rigardo; zorge kombitaj haroj; kravato streĉe nodita, arte sed ne artiste; belfasona vesto, sobre eleganta (lia patro estis mondfama tajloro).

Lia modesta sinteno; lia simpla pozo, rekta sen rigideco, fleksebla sen moleco; lia voĉo nek tro laŭta nek tro alta; lia parolo sen preciozeco kaj sen la sakraĵoj kaj maldecaĵoj kutimaj en la konversacioj de viraj adoleskantoj—ĉio en li havis ion aristokratecan, kvankam lia familio estis nek nobela, nek socie altnivela.

Li estis dikredanto, ne devoto; patrioto, ne ŝovinisto; modere kontraŭrevolucia sen agresemo. Kun firmaj personaj konvinkoj li estis tre tolerema, kaj la diskutoj kun li restis ĉiam en la tono de ĝentileco kaj amikeco. Kvankam ne esperantista li rigardis kun intereso kaj simpatio la lingvon internacian kaj ĝian internan ideon.

Li estis inteligenta, studema, bona lernanto en ĉiuj fakoj, sed pli inklina al heletro, retoriko, metafiziko, ol al matematiko kaj konkretaj sciencoj!

Li estis delikata poeto kaj pensigis min pri Albert SAMAIN. Mi ne scias kial, ĉar fakte li ne imitis tiun poeton nek iun alian. Lia stilo estis persona, sen pena celado al originaleco. Liaj versoj fluis facile. Ilin aŭdante oni ricevis la impreson, ke la pensoj kaj sentoj ne estus esprimeblaj en alia formo.

Eble pro amo al kontrastoj li kaj mi estis kunligitaj per granda amikeco.

En novembro 1916 ni faris ambaŭkune laston ekskurson al malnova kastelo apud ANDUZO. La morgaŭon mi enlitiĝis kun tifoida febro, kiu en tiu tempo estis grava kaj danĝera malsano. Samtempe li eksentis la unuajn simptomejn de ftizo, kiu ankaŭ estis tre danĝera malsano, kiu ĉiujare mortigis multajn gejunulojn ĝis estis ekkonataj la antibiotikoj.

Dum multaj jaroj ni, liaj ses amikoj, tre ofte vizitadis lin en la kampara bieneto luprenita de liaj gepatroj por havigi al li puran aeron for de la karbominoj, de la industriaj fumoj kaj de la urbaj poluaĵoj.

En novembro 1918 ni forlasis ALESON : unu iris al la instruista lernejo en NIMO, la kvin aliaj al la lernejo pri Artoj kaj Metioj en AIKSO-la-Provenca. Ĉiu ferio reveniĝis nin al ALESO kaj ni tuj kiris al la kampardomo de Johano. Ĉiufoje ni konstatis laŭ lia mieno la progreson de la malsano. Ni estis certaj, ke li plene konscias pri la graveco de sia sanstato, sed li neniam plendiĝis kaj ofte sin montris la plej gaja el ni ĉiuj. En printempo de 1920 liaj lastaj fortoj estis elĉerpitaj kaj en la Paska dimanĉo li milde estingiĝis. Ni akompanis lian ĉerkon al la urba tombejo.

Kelkajn tagojn poste lia patrino donacis al mi tiun skatoleton, kiu sekvis min en ĉiuj miaj translokiĝoj. Mi esperas konservi ĝin ĝis mia propra fino. Ĉu fetiĉismo ? Ja sendube, sed iafoje la koro parolas pli laŭte ol la cerbo, la racia penso cedas al la sentoj.

Li do forpasis unua. Post longa tempo sekvis Amato (1955), Roĝero (66), Renato (68), Marcelo (72), Luizo (80). El la sep mi restas sola. Mi povus ankaŭ skizi portreton pri ĉiu alia ĉar ĉiu havis proprajn kvalitojn, individuan temperamenton kaj originalan karakteron. Ilin priskribi estus por mi interese, sed por vi tio fariĝus teda. Mi do limiĝos min al Johano.

Mi ne volis vidi lian rigidan korpon sur lia mortolito ĉar mi preferas konservi la bildon de la deksesjara knabo, vigla, gaja, poeziamanta, de Johano, kompano kaj amiko de mia juneco.



Bela kanto

La bela regimento pasas,
Klariono sonas, tamburo batas.
Venas, kuras, popolamaso
Por aklami la batalantojn.
La muziko
Brile bela
De fier' plenigas la korojn.
Ĉiu pensas
Ke Francio
Vidos siajn filojn venkaj.
La dio de l' bataloj donu
Palmojn, laŭrojn al tiuj knaboj.
Ilin ĉiujn kronu la venko
Triumfu niaj militistoj.
Pro Francio, pro la patrio
Marŝu vi heroaj soldatoj.
Donu kuraĝe viajn vivojn
Por la flago en la bataloj.

Jen estas la teksto, kiun en 1910 kantiĝis al ni nia bona instruisto, Sinjoro C., socialisto. Tia estis la eduko ricevata de la knaboj de la III-a Respubliko en ĝia publika lernejo, oficiale laika. Ĉu ? Laika tiu alvoko al la dio de l' bataloj ? Laika tiu kulto al la sangavida dio, al idolo Patrio, kiu postulas homajn oferojn ? Nun, en tiu ĉi jarcento fino neniuj aŭdacus proponi tiajn vortojn al infanoj. Tamen ne kredu, ke estas forigita la naciismo. Ne venis jam la fina venko post kiu la Internacio ekregos en tutmond'. La ĉiama malamiko nur aliĝis sian aspekton, metante trankviligan maskon sur sian vizaĝon. Nun ĝia propagando volonte uzas pseŭdoraciajn argumentojn : ekonomiajn, sociajn, kulturajn, eĉ biologiajn. La bona popolo glutas tiun kaĉon kiel antaŭ okdek jaroj ĝi glutis la ebriigan trinkaĵon de la patriotaj kantoj kaj ni konstatas tie kaj ĉi tie refloradon de ŝovinismo, ksenofobio, rasismo, militarismo. Estu trankvilaj, vi bravuloj, estos ankoraŭ belaj fruktodonaj tagoj por la vendistoj de kanonoj kaj aliaj amasmortigiloj.

Konsciu ni, pacamantoj, ke la valora malamiko plu vivas. Ni ne lasu endormiĝi nin per la kanto de l' sirenoj. Ni restu maldormantaj, ĉiam pretaj por la ĉiam necesa lukto.

Legante la Libron

Oni jam diris : en la Sankta Biblio troviĝas ĉio kaj la malo de ĉio. Ja eĉ en partoj atribuitaj al unu sama aŭtoro.

Mi malfermas la libron hazarde, kaj trafas en la verkoj de Salomono. La Predikanto : vantaĵo de vantaĵoj, ĉio estas vantaĵo. Kiu estis tiu Salomono ? Granda reĝo, riĉa kaj potenca. Ŝajne li havis ĉion por esti feliĉa. Tamen : ĉio estas vantaĵo. Neniu pli forte esprimis la seniluzian senton fronte al la vanteco de la vivo. Ĉar tiu riĉa kaj potenca reĝo estis ankaŭ homo klera kaj inteligenta, klarvida kaj profundpensa. La saman pesimisman filozofion ni trovas en pluraj lokoj de la Sentencoj sed ni daŭrigu la legadon. Jen alvenas la Kantiko de Salomono, kiun la francaj tradukistoj nomas Kantiko de l' Kantikoj : belega ampoemo.


Ni scias : kristanaj ekzegezistoj interpretas ĝin kiel profetaĵon pri la mistika amo inter Kristo kaj lia Eklezio. Al tiuj sinjoroj ja ne mankas aplombo. Tute ne ĝenas ilin la fakto, ke neniu rabeno kaj neniu judo povus akcepti ilian tezon : ili ja posedas la Veron ! Mi havas hejme ekzempleron de franclingva eldono, en kiu tiu tezo estas prezentita per ĉapitrotitoloj enŝovitaj en la presaĵo kaj tiu eldono estas oficiala en la franca reformita Eklezio.

Mi emus krii al tiuj komentistoj : Sinjoroj, ĉar tiu skribo estas laŭ vi sankta, almenaŭ respektu ĝin, kaj ne miksu kun ĝi viajn proprajn elcerbaĵojn. Sed ĉu valorus la penon polemiki kun tiaj sentimaj certuloj ? Mi nur ridas, kaj preterpasas, kaj mi legas la tekston nuda, ne en la originalo, ĉar mi ne scipovas la hebrean lingvon, sed en bona traduko kiel tiu de la hebreo Zamenhof, kaj kion mi trovas ? Nur himnon al homa amo, fervoran esprimon de amo de virino al viro, kaj de viro al virino.

Ja sendube la aŭtoro estis granda poeto kaj granda amanto.

Ni relegu la Kantikon, kaj vivu Salomono !

VALO.



ALDONENDAJ ESPRIMOJ

(kompilis : Lucien BOURGOIS)

- 673 (ne pas en croire ses yeux) - ajouter : /al la propraj okuloj
 674 (croire sur parole) - ajouter : fidi ies vorton Z
 culot (avoir du) : voir 3449
 693 (faire date) - ajouter : qui fait date - epokfara
 débordant d'activité : bolanta je aktiveco
 702 supprimer : sidi en vera kaĉo, sidi ĝiskole en la peĉo
 défensive (sur la) : en defenda sintenado B
 défilier au pas de l'oie : paradmarŝe defili
 723 (demander la lune) - ajouter : peti pri la luno
 déménagement à la cloche de bois : lumluma forflugo (SULLIVAN) - voir 732
 démener comme un diable dans un bénitier (se) - voir 31
 demoiselle de petite vertu (une) : malvirta fraŭlino - voir 1128
 741 (aux dépens de) - ajouter : je la kosto de Z
 dépouiller avant de se coucher (se) - voir 758
 749 (la dernière demeure) - ajouter : /ripozejo
 750 voir 1392
 754 (le dernier sommeil) - ajouter : la lasta ripozo
 756 voir 363
 désespoir de cause (en) : esperfine - voir 753
 759 dès potron-minet : voir 2374
 dessin (à) : intence
 766 (avoir le dessus) - ajouter : superpovi
 769 (en avoir par dessus la tête) - ajouter : pop. : en avoir ras-le-bol
 détaier comme des lapins : forkuri kiel kunikloj/leporoj
 775 (au détriment de ...) - ajouter : domaĝe al
 780 ajouter : c'est à deux pas d'ici - estas nur kata salto de ĉi tie
 782 (avoir deux poids et deux mesures) - ajouter : havi falsajn pesilojn
 786 (- je lui dois une fière chandelle) - ajouter : mi ŝuldas al li grandan dankon
 789 (dévorer des yeux) - ajouter : manĝegi per la okuloj B
 792 (faire le diable à quatre) - ajouter : fari diablobruon - voir 340
 diriger ses pas vers ... : alpaŝi (+ accusatif)
 doigts crochus (avoir les), avoir la main crochue : esti monavida/prenema
 doigts de fée (avoir des) - esti feine fingrolerta
 fig. dans ce domaine : en tiu ĉi rilato
 817 (donner accès) - appris "doni", ajouter : havigi
 818 (s'en donner à coeur joie) - ajouter : amuzegiĝi
 828 (donner des coups d'épée dans l'eau) - après "rivière", ajouter :
 battre l'eau avec un bâton, se battre les flancs, faire de la bouillie pour
 les chats

La moritato pri Mackie Messer

Kaj la ŝarko havas dentojn,
dentvizaĝe montras sin.
Kaj Macheath tranĉilon havas,
sed neniu vidas ĝin.

La naĝiloj, ho, de l' ŝarko
ruĝas post atak' al sang',
sed la Mackie-Messer-gantoj
ne parolas kiel lang'.

Ĉe Tamizaj akvoj verdaj
oftas nun subita mort'.
Estas nek holer' nek pesto,
Mackie kulpu pri ĉi sort'.

En dimanĉo bele blua
kuŝas morta vir' sur strand',
iu homo, Mackie Messer,
iras preter domovand'.

Kaj Ŝmul Maier malaperis
kiel ofte riĉa vir'.
Lian monon havas Mackie,
tiu nekaptebla Sir'.


Jenny Towler-n oni trovis
kun tranĉilo tra la mam'
kaje iras Mackie Messer.
Li ne scias pri la dram'.

Transportisto Alfons Glite,
kien li foriĝis nur ?
Kiu ajn la veron sciuj,
Mackie scias nur pri spur'.

Dum Soho-a fajro mortis
sep infanoj kaj oldul'.
Ĉe la homoj staras Mackie
kaj sen sci' pri l' kaŭz' de l' brul'.

La vidvino neplenaĝa
- tre konatas ŝia nom' -
ŝi vekigis perfortita.
Mackie, kiom prezas hom' ?

Bertold Brecht



Kaj la fiŝoj malaperas.
Sed ĉagrene por l' kortum'
oni vokas nun la ŝarkon.
Tiu neas sen cerbum'.

Kaj li restas sen memoro,
netuŝeblas per juĝej'.
Ŝarko estas ja ne ŝarko
sen la pruvoj pri l' ide'.

tradukis Hagen Hirte
el la Trigoŝa Opero

Leŭtaj informoj

ĴUS APERIS

"LUDI POR RIDI" - Kunagadaj ludoj por grupoj. Kun multkolora kovrilpaĝo, kun pl' ol cent ludekzercoj, kun pli ol 30 fotoj !

La prezo por unu ekzemplero estas : 20 gd. (inkluzive de la sendkostoj). Eblas mendi al UEA, konto : gjtc-q aŭ rekte sendi la monon al la aŭtorino :

Ghislaine Tilleux-Craenhals, Hauts de Meuse, 4 B-5011 ERPENT (Namur). Ŝia konto estas en banko Crédit Communal, numero 083-2461963-09 je la sama adreso. La prezo por unu ekzemplero estas 360 belgaj frankoj (inkluzive de la sendokostoj).

La poŝtĉekkonto de la aŭtorino : 000-0827604-97.

Notinde, ke se vi mendos tro ekzemplerojn aŭ pli, tiam vi havos rabaton de 20 %.

La 85a franca kongreso de U.F.E

okazos en Pau de la 7a ĝis la 11a de majo 1993.

Invitas : ESPERANTO PAU-ADOUR.

Adreso : Esperanto-Kongreso ĉe Jeanne TIRCAZES
45 av. Béziou, F 64140 BILLERE

Informojn kaj aliĝilojn peti ĉe la ĉi-supra adreso.

KUNLABORO KUN OKCITANISTOJ EN TULUZO

La okcitanistoj invitas la esperantistojn el la Tuluza regiono al kunlaborado en sia "Festo de la Lingvoj 93", kiu okazos de la 20a de marto ĝis la 3a de aprilo 1993. Tiu grandega festo prezentos ĉefe la minoritatajn lingvojn. Tie okazos ekspozicio pri esperanto, prelegdebato ĉe la universitato kun Claude PIRON (konfirmote) kaj spektakloj por plenkreskuloj kaj infanoj.

Informojn petu de Esperanto-Kultur-Centro
1 rue Jean-Aillet, F-31000 TOULOUSE

(E.K.C. grupigas membrojn de diversaj E-asocioj de la regiono, aliĝintaj ĉu al UFE, SAT-Amikaro, E-ferfojistoj, ĉu sendependaj kiel EUOKKA.)

ĈU KANTO DE CIGNO POR

La 4a numero (jaro 1992) de "Rok-gazet" estas belega. Eble tro belega, ĉar supozeble multekosta. Tial la redakta skipo sendas samtempe sian lastan alvokon por ricevi helpon, kunlaboron kaj, kompreneble, abonon.

Ĉu tiu alvoko estos aŭdita? Espereble, jes! Se ne, malaperos trebon-kvalita gazeto, nepre havenda atuto por florigi esperanton en la junularo.

Jen la utila

Rok-Gazet'-abonilo

EUROKKA Esperanto-Rok-Asocio
F-31450 DONNEVILLE
Francio
tel. 33+ 61 81 95 65

Abono kostas 100 FRF aŭ 35 NLG aŭ 26 IRKP (13 USD por netranspagipovaj landoj), kaj validas por 4 numeroj.

Familia nomo: _____

Persona nomo: _____

Asocio: _____

Adreso: _____

Telefono: _____

Mi deziras aboni ekde n-ro: 1 - 2 - 3 - 4

Mi deziras ricevi la numerojn: 1 - 2 - 3 - 4
(po 8,75 NLG)

Mi sendas 100 FRF per ĉeko aŭ poŝtmandato (nur por Francio).

Mi sendas 35 NLG per internacia poŝtmandato al EUROKKA.

Mi pagas per UEA-konto al EUROKKA, UEA-konto Rokk-b.

Mi pagas 35 NLG (aŭ 13 USD por netranspagipovaj landoj) al la peranto de Rok-Gazet' aŭ al la esperanto-asocio de mia lando.

Mi sendas 26 IRKP-ojn (internaciaj respondkuponoj) al EUROKKA

Dato kaj Subskribo.

ATENTU!

BILANCO de LAŬTE! en 1992

Ankoraŭ ĉi-jare **regresis la abonantaro**, falante de 418 (en 1991) al 360. Plej multe temas pri nerepagitaj donacabonoj en nepagipovaj landoj (-41) kaj, en Francio, pri nereabonoj en grupo "Esperanto-Gironde", kiu nun ne plu aŭtomate abonigas siajn membrojn, kio ŝajnas ja pli konforma al la liberama formulo de **Laŭte!**

Malpli dika jarkolekto estas iel konsekvenco de la malplia enkasigo de abonoj, sed pli simple de tio, ke alvenis malpli da materialo: 276 paĝoj en 1992 anstataŭ 360 en la escepta jaro 1991.

Redaktado. Mi jam havis okazon diri kion mi opinias pri tradukaĵoj. Mi aperigas ilin nur esceptokaze. Tamen por novaj legantoj mi konfirmu, ke **Laŭte!** celas aperigi ĉefe kion volas esprimi la legantoj: iliajn proprajn vidpunktojn, iliajn originalajn verkaĵojn, sencensure, kiu ajn estas la temo. Tiel povas najbari plej diversaj vidpunktoj, plej diversnivelaĵoj tekstoj.

Abonanto iam demandis min, kial mi ne aperigas mian propran vidpunkton. Mi fakte malofte verkas mem. Tajpante viajn artikolojn, mi ja ofte pensas pri tio, kion mi povus mem aldoni komente, sed mi scias ke en la venonta numero alia(j) leganto(j) esprimos pli lerte, kion mi mem dirus. Kaj estas ja tiom da publikigendaj kontribuoj...

La presado ofte ĉagrene konsternas min. Kulpas jen la presilo, kies inko ŝanĝiĝis al malpli sekiĝema, jen la presanto mem. La presilo nun emas makuli la dorsflankon de la falantaj folioj, kiam tiuj estas el "normala" papero. Solvon provizoran mi trovis por la du lastaj numeroj 101-102, uzante pli sorbeman - ankaŭ pli multekostan - paperon. La reciklita, evidente, ne plu taŭgas. Difekteto ankoraŭ ne kuracita igas iujn liniojn ne perfekte legeblaj. Provizoran solvon mi trovis lasante pli larĝan marĝenon supre de la paĝoj (vd. tiun ĉi numeron), sed nepre necesos venigi kuraciston aŭ mem roli veterinare...

En n-ro 102 la fifama koboldo de la "presarto" plagis plurfoje. En multaj ekzempleroj estas inversigitaj la paĝoj 44/21. Kompense mi sendas denove tiujn paĝojn al la pasintjaraj abonantoj, por ke ili povu laŭeble ripari la damaĝon per iom da gluo... Malpli grave, tiaj estis ankaŭ la internaj paĝoj de la broŝurlisto. Ankoraŭ en L!102, p.32, tajperaro nepardonebla, komence de la 3-a alineo. Forigu la sisteronan akuzativon ĉe: "partoj de tiu kapablo produkti estis akaparita..." La kulpulo hontas, sed tio neniel helpas, ĉu?

Bilanco. Plej draste falis la enkasigita sumo de ĉ. 26000 frankoj al ĉ. 17000. Dume, la afranko plialtiĝis (des pli ke mi sendis plurajn numerojn aviadile al ekstereŭropaj landoj). Tamen la bilanco pozitivis kaj la kaso ĝenerale bonfartas kun provizo sufiĉa por elteni eventualajn novajn

malagrablaĵojn. Tial la abonprezo restas fiksita je 60 FF / 80 FF, kaj nun estas proponata eĉ rabatitan abonprezon (40 FF) por helpi la sendadon de L! al nepagipovaj landoj.

Abonoj-Donacoj	+ 17225,65	Antaŭa saldo	24767,70
Eldonado	- 9967,50	Saldo de '92	1981,24
Afrankado	- 5276,91	En kaso nun	26748,94
Jara saldo	+ 1981,24		

Bilancio de SAT-Broŝurservo en 1992 :

En 1992 aperis neniu novaĵo. Por iom kompensi, mi sendis al la broŝurabonantoj la libron de laŭtulo G. Ledon **"Al la tero returne"**, eldonita en Brazilo. Por 1993, interkonsente kun la tradukinto Vilhelmo Lutermano, estas projektita la eldonado kaj dissendado de **"Rakontoj"** (unua serio) de KAFKA. Eble la tradukinto mem povos eldoni la duan kajeron per la emeritiĝinta ofsetilo "Arturo", kun kiu li nun provas amikiĝi.

SPEZARO

Vendoj-Monprovizoj	25730,21	Eldonadoj	1650,00
Donacoj	1000,00	Afranko	4371,40
Diversaĵoj	2278,35	Diversaĵoj	4692,50

Jara saldo : 18294,66 Antaŭa saldo : 26737,42 Nun : **45032,08**

Ekipado de la Muelejo :

Dank'al donacoj de multaj gelaŭtuloj ni disponas pri relative grava kapitalo por plu provizi la renkontiĝejon per de ĉiuj uzablaj ekipaĵoj. Ĉar mankas en la muelejo apartaj ĉambretoj por restademuloj ne povantaj tendumi, estas projektita ekde nun (sed kiam tute realigita ?) la loĝebligo de la mueleja subtegmentejo (tie eblas 3 ĉambroj) kaj de la dua dormejo en la ekstera konstruaĵo.

Projektoj de restadoj en 1993 : Bedaŭrinde, ne povos ĉeesti la priteatron restadon la ĉefa iniciatinto Henriko Castiau. Ĉu tamen ĝi okazos ? Tio dependas de vi... Fervojistaj esperantistoj el Tuluzo eble okupos la muelejon en la lasta semajno de julio, tuj post la E-familioj...

Donacis : H.C. 30, F.P. 50, S.A. 100, M.T.L. 120, E.B. 3290, M.L. 80, W.L. 337, sume 4207.

Elspezoj : 1645 (gipsado) + 445 (asekuro) : 2090. Jara saldo : + 2117.

La antaŭjara saldo estis : 20683,15. La nova estas : 22800,15 FF.

La "Gilles" el Binche (Belgio)

*



La karnavalo en Binche (pr. Binše) estas tre grava okazaĵo. Ĝi estas unu el la plej famaj en Eŭropo. La belega kostumo de la "gilles" devenas de la festo, kiun Maria el Hungario donis en 1549 okaze de la vizito de Karlo la kvina kaj Filipo la dua, estonta reĝo de Hispanujo. Dum tiuj festoj aperis Inkaaj indianoj kun plumoj ĉekape. La nuna ĉapelo estas riĉe farita el strutoplumoj. La vestaĵo estas, ĉirkaŭ la brusto kaj la dorso, dike remburita per pajlo. La "Gilles" surportas lignoŝuojn kaj ili havas zonon de kiu pendas sonoriletoj.

Per unu mano ili tenas korbeton plenan de oranĝoj el kiuj ili, foje, ĵetas unu al la ĉeestantoj.

Kelkaj reguloj estas nepre respektendaj ; ekzemple, dum la Grasa Mardo, neniu "Gilles" rajtas iri en la stratoj sen iu, kiu tamburas, aŭ sen akompanantaj muzikistoj. Dum la tuta tago ili ne rajtas trinki ion alian ol ĉampanon. Kompreneble, se estas ventego, ili ne kapablas surmeti la plumĉapelon.

La "Grasa Mardo" estas la plej grava tago, sed fakte la preparaj aferoj komenciĝas jam 6 semajnojn antaŭ tiu tago. Ekde januaro la tamburoj alvokas la estontajn "Gilles". Oni dancas en la trinkejoj. Poste, dum kvar semajnoj okazas la "SOU MONCES" (malnova franca vorto kiu signifas **alvokon, kunvokon**). Dum tiuj semajnoj, la "Gilles" devas, ĉiudimanche, iri sur la stratojn, vestata per simpla kitelo, sed jam surportanta la zonon kun la sonoriletoj. Dum tiu periodo okazas en Binche multaj gajegaj maskobaloj.

La Grasan Dimanĉon, je la deka, aperas la maskovestataj "Mam'zelles" (el **mademoiselles**, t.e. fraŭlinoj). Ili viciĝas kaj, akompanataj per rulorgeneto, ili dancante iras al la centro de la urbo kaj tie disvolviĝas en ĉiujn stratojn. Finfine venas la Grasa Mardo. La grupoj el "Gilles" formiĝas je la oka matene. Tuj, en la tuta urbo, regas la muziko de la fanfaretoj, kiuj ludas danmuzikon laŭ tre stranga ritmo, kiu rapide fariĝas sorĉa. Nun la "Gilles" surportas maskojn,

Ĉiuj la saman, kun okulvitroj. En la komenco de la posttagmezo ili surmetas la ĉapelojn kaj daŭre dancas, kondukante la urbon al freneza etoso. Malfrue en la vespero oni lumigas grandan fajron sur la ĉefplaco por bruligi la pajlon de la vestaĵoj. Poste okazas belega piroteknikaĵo.

Henriko CASTIAU

La alia GOETO...

Ĉiuj kleraj homoj scias pri la poeto kaj verkisto, sed ne ĉiuj scias ke, krom pri politikaj kaj ekonomikaj aferoj, li vaste interesigis ankaŭ pri ĉiuj sciencoj, ĉefe pri anatomio.

En 1837, la Pariza eldonejo Cherbuliez eldonis la francan tradukon de **"Verkoj de naturhistorio de Goeto"**, kiun oni povas vidi en la biblioteko de la Pariza Naturscienca Muzeo.

Tio ne estas nura rimarko : li asertis, ke la "intermakzela osto ekzistas ankaŭ ĉe la homo, dum aliaj sciencistoj diris, ke ĝi ekzistas ĉe la kvarmanuloj kaj neis ties ekziston ĉe la homo. Goeto tion malkovris, dum li studis kraniojn de diversaj bestoj kun profesoro Loder. Li esploris la manieron kiel tiu osto ligiĝas kun la aliaj ĉe diversaj bestoj (leono, simio, bovo, ĉevalo, lupo, rosmaro, babiruso, ktp.), kaj asertis, ke la malsameco de la formoj ĉe malsamaj bestoj indas seriozan ekzamenon.

Kun iom da miro mi konstatis, ke la "Grand Larousse Encyclopédique", kiu tamen diras, ke Goeto vaste interesigis pri ĉiuj sciencoj, mencias nenion pri tiu grava malkovro, kiun pluraj aliaj sciencistoj supozis, sed ne evidentigis.

La G.L.E. mencias nur libron pri la metamorfozo de la plantoj (1790) kaj alian pri la teorio de la koloroj (1810). Kompreneble, ĉio, kio aldonis, kaj ankoraŭ aldonas ion al la teorio pri transformismo, ne plaĉas al ĉiuj potenculoj kaj la eldonisto pli ŝatis silenti !

Gastono (27.12.92)



KIEL LA FLOROJ SOLVAS LA AMORPROBLEMON ?

Ĉar la floroj estas sur sia loko kvazaŭ alnajlitaj, la amorproblemo konsistas el tio, ke alcelan peranton ili nepre bezonas. Vastas la elektogamo : de la meĥanikaj foje kapricaj helpantoj, kiel vento aŭ pluvo, al la pli fidindaj kaj dinamismaj, kiel la birdoj, vespertoj, insektoj - eĉ homo, kiam artefaritan fekundigon ĝi praktikas por plibonigi difinitan plantospecimenon. Sed notindas, ke la duaĵo floro/peranto estas por ĉiu specio difinita unu fojon por ĉiam. Cetere gravajn por la planto strategiojn ĝi implikas, ĉar la elektitan peranton la floroj devas nepre allogi, por ke ĝi estu tirata al la plenumado de sia tasko : la floropolvon disporti de floro al floro.

Ŝajnas, ke birdo estis la tutunua peranto. Eĉ nun sub la tropikaj arbaroj (ekzemple en Brazilo) 20 %-oj el la floroj (proksimume 30 000 specioj) estas fekundigataj pere de la birdoj. Etaj birdoj veras por dikaj, riĉe buntaj sendodoraj floroj, ĉar kolorojn birdoj perceptas tre bone, dum ties flarosenso estas preskaŭ nula. Tiuj floroj tre ofte sin veŝtas per la ruĝa koloro, por la birdoj aparte alloga ; foje per la blua, laŭ lazura nuanco sub niaj klimatoj nekongrata. Ankaŭ ofte okazas, ke la petaloj alprenas la kolorojn de la birdoj mem, kun miksitaj nuancoj, kiuj pensigas pri papaga plumaro. Jen la birdo impetas serĉe al nektaro, kiun ĝi avide trinkas. Ĉar delonge birdoj malkovris, ke multe pli agrablas nektaron (do sukeritan akvon) trinki el floro, ol ordinaran akvon ricevi el folio... Tial la floroj egalkvante nektaron liveras. Tion ilustras kreskanta en Ameriko floro, kies nomo signifas "la ploranta(n) bebo(n)". Samtempe, kiel ĝi eltrinkas, la birdo disportas polenograjnojn de floro al floro.

Dumnokte okazas nenio, ĉar nur dumtage disvolviĝas la birdofekundigo. Tamen kelkaj floroj preferas, ke la amorritoj estu plenumataj en mallumo ; tamen alian solvon ili estis devigataj eltrovi. Ekzemple sub la tropikoj, vespertoj estis elektitaj, kiel peranto. La baobabo, tiu giganto en sekaj varmaj regionoj vivanta naskas dikajn pendflorojn provizitajn per neimagebla nombro da stamenoj (ĝis dumil) ; ĉi-lastaj siavice liveras konsiderindan kvan-

ton da poleno. La planto estas perfekte adaptita al la blindaj vespertoj (nur blankas la floro), dum ĝi eligas odoraĉon je mucido, tute similan al tiu de la vespertoj, kiuj rekoninte sian kvazaŭ propran odoron, estas logtirataj al sia fekundiga tasko. Krome por ke la folioj ne ĝenu la vespertan flugadon, pendas la floroj ĝis la suba arboparto. Jen tipa ekzemplo pri reciproka adaptiĝo animala kaj planta.

Por la etaj floroj rolas la insektoj. En niaj regionoj 80 % estas fekundigataj de la insektoj, neniam da ili de la birdoj kaj la restantaj 20 %-oj de la vento kaj okaza pluvo. Tiele pravis la naturo : se la duaĵo konsistus el floro kaj birdo, per kio sin vivtenus la kompatinda flugulo dum longa vintro, kiam floroj malĉeestas ? Ĝi tiom longe fastus, ke ĝi finmortus. Pro tio sub la tropikoj sin tenas la birdoj. Necesis do relajso : la insektoj, kiuj travintras subforme de larvoj aŭ ovoj kaj superabunde svarmas, dum printempas. Eĉ rimarkindas, ke ne nur dumprintempe tiu kronologia adaptiĝo funkcias : ĝi observeblas tra la tuta historio. Ĉar daŭradas tiu mirinda amhistorio flora kaj birda de cent ĝis 150 milionoj da jaroj... Ambaŭ partneroj samtempe kunevoluis, prezentante duaĵojn pli kaj pli reciproke adaptitajn.

Sed laŭ tre diversaj manieroj la insektoj vizitas la florojn. Mirigaj strategioj perfektigis : en Malagasio kaj Brazilo, egaj floroj estas fekundigataj de etaj insektoj, kies rostro estas post longa evoluo atinginta la longon 30 centimetrojn. En la komenco la insekto trafis foliojn al floroj tre similajn. Ĉar la foliojn ili kutimis manĝotondi, ankaŭ al la floroj ili same kondukis, polenon samtempe disportante. La neplene tondomanĝitaj floroj estistiel fekundigataj.

Jen nunepoka ekzemplo : iuj insektoj eniras la floron dum la tago. Ĝi fermiĝas, ilin malliberigante. Tiam terurajn enajn damaĝojn ili kulpas. Kiam matehe la vundita floro malfermiĝas, la liberigitaj elflugas kaj sin direktas al alia malfermita floro, kiun ili surŝutas per floropolvo. Ankaŭ en la unua kelkaj nedifektitaj pistiloj estas fekundigataj. Ja konsiderindajn perdojn la planto suferas,

sed pro ties abundego la specio pluivas.

Aliaj floroj odoras je putrinta karno - rava parfumo por muŝoj kaj melolontoj ! La papilioj, siaflanke, enigis sian suĉilon en la nektarotubon. Ili jam vestis siajn flugilojn per brile belegaj koloroj, foje kun la floro interrespondaj. Tia kvazaŭa kudroarto anoncas la plenan mimetismon ĉe orkideoj, kiuj sin insekte (abele) maskovestas.

Florojn la vespoj ne ŝatas, sed fruktojn ; fruktojn la abeloj ne ŝatas, sed florojn. Bone tiel, ĉar se ambaŭ florojn ŝatus, ili interbatalus. Nu, pli malfrue ol la abeloj venas la vespoj. Kaj pli da laboro abelo havas por plenumi, ol vespo, ĉar sian posteularon ĝi nutrobredas. Ĉiutage abelo vizitadas centojn, foje milojn da floroj. Kiam ĝi estas la floron lokalizinta, ĝi scias, kiel elturniĝi por havigi al si la mielodonan nektaron kaj piedkolekti la polenon sur la aliajn florspecimenojn portotan. Kaj tempon ĝi ŝparas per senlaca ripetado de spertolernita gesto.

Abeloj florojn lokalizas laŭ la koloro, odoro kaj formo. Sed la kolorojn ili ne perceptas sammaniere, kiel ni : la ruĝan ne, dum la ultraviolan jes. Tre plaĉas al ili la flava, blua kun miksaĵo el ambaŭ - ekzemple neforgesuminoj. La flava kernopunkto signas la lokon, kie ili devas enigi la suĉilon por trafi la nektaron. Ĉar la plantoj strategiojn perfektigis por esti vizitataj : por ke la koncerna insekto povu surteriĝi (pardonu : surfloriĝi), ekzistas, samkiel en flughavenoj, trakoj signalizitaj pere de harlinioj, aŭ de linioj malsamnuancaj, ol la fundamentaj petalkoloroj, eĉ per odortrakoj (tion ilustras la blanka konvolvulo) (blanka por ni). La flavan punkton la insekto lokalizas, kaj ĝi plenumas sian komision. Poste la punkto aliĝas je la ruĝa koloro, kio signifas, ke estas jam farite !

En la komenco la boragofloro aperas ruĝa - kio insektalingve tradukeblas per : "momenton ! mi ankoraŭ ne sufiĉe maturiĝis". Kiam ĝi pretas, ĝi bluiĝas, estas vizitata kaj fekundigata.

Tute inverse konsterniĝas la insekto ĉe nimfeo aŭ pompa magnolio, ĉar signalo nenia. La laboronto ĉie stumblas. En la plej favora okazo ĝi alprenas iom da poleno kaj

ovolojn fekundigas po unu aŭ du, sed preskaŭ senefika estas la rezulto. Kial? Ĉar magnolio estas floro pli praa, ol la insektoj. Ĝi sukcesis adaptiĝi en niaj regionoj, sed mankas por ĝi la birdoj. Tial ĝi estas en danĝera situacio.

Difinita orkideokategorio eligas tre fortan odoron je mento, kiun la masklaj insektoj prenas al si kaj stokas en iaspeca poŝo, ĝin disŝprucigante sur sian teritorion - jen praa kodo de la amlingvo, kies vortojn la parfumoj konsistigas, ŝatata logaĵo por eventualaj femaloj.

Kruelaj tamen povas montriĝi la interrilatoj. Ĉe juna planto el Sud-Afriko dika polenbulo estas ligita al la floro per iaspeca rimeno, kiun la insekto nepre devas malnodi por forpreni la polenbulon. Cetere ĉi-lasta perfide alfiksiĝas al la insekta dorso per pikiloj. Se ne temas pri fortikulo, la kompatinda besteto dum horoj flugilbatadas enriemene implikata ĝis... morto venos. Samfamilia planto alitiras la insekton, kiu ovodemetas en la floron. La larvoj deŭus eloviĝi kaj malvolviĝi, sed la floro rifuzas ilin nutri, liverante tombon prefere al lulilo. Tamen de tempo al tempo la insekto demetas la ovojn en pli akcepteman floron; tial la specio ne malaperas.

Iom nun pri la meksikdevena jukajo. Ŝirmejon ĝi konsistigas por la insektoj. En la dezerto estas varmege. Dum la tagoj la insektoj sin ŝirmas de troa varmo kaj demetas la ovojn. La larvoj sin lokas en la ovarion. Post ovodemeto la insekto kolektas polenon kaj fekundigas la loĝatan ovarion, por esti tutcerta, ke ĝi fruktiĝos kaj nutros la larvon. La nemangitaj de larvoj ovoloj donos semojn. Poste la larvo elfloriĝos kaj siavice naskos similulojn. Tiukaze oni atingas la perfektan ekvilibron, la sukcesintan simbiozon. (Beladono kaj kampanulo estas ankaŭ ŝirmejoj).

Kia estos nia konkludo? Certaj plantoj scipovas doni, kelkaj ricevi; aliaj scipovas interŝanĝi kaj kundividi. Tio estas la fundamenta amoleĝo, kiun la floroj malkovris en tre fora pasinteco, kiam homo ankoraŭ ne ekzistis.

S. BONIOL

OMAGE AL FORPASINTO

Sur tombo de l' amiko, po tri mi florojn lasas.
Amika super tombo, aŭtunaj nuboj pasas.

Iridofask' el blu' profunda
- Magneta blu', fascino flu'
Rigardon najlas. Trudo vunda.
Eĉ okulferme bluas plu.
Tra ĉi tombej', nenia bru'
Krom tri frazeroj de paru'.

Langformaj longas la koroloj.
Ĉu flagras flora kandellum' ?
Kunflagras feblaj la paroloj
De la preĝant' laŭ blua fum'.

Obstine taktas la kantulo.
Obstinas viv- kaj mortolulo.

Sur tombo de l' amiko, florfingroj alten preĝas.
Amika super tombo, lazuro frida reĝas.

Kontraste brunas grejsa pot'.
En ĝi fermentas sombra kot',
Potenca humo, nutra grot'
Por disflamanta branĉ' erika.
Laŭvicaj kupro, violstompo.
Kunvibris plene kor' amika
Kun la subtilo de ĉi pompo.

L' arbara plendo lin obsedis.
Al log' de dub-aspektaj fungoj,
De flustra filikaro, cedis
L' amanto de centjaraj trunkoj.

Erikopoto, lumo not',
Amika tutlasta dorlot'
Ĉis la sojlo de morthipnot'.

Sur tombo de l' amiko, orkupra tufo brilas.
Amika super tombo, orkupra sun' subiras.

Ploristo pala de korprem',
Tentakl-ĉetenda krizantem' :
Jen plej korŝira rekviem'.

Vin ne plu laudu kantileno
 Ĉar malkunigon vi simbolas.
 Ekstumblas koro ĉe l' ameno
 Kaj malakcepta volo bolas.
 Memorofloro, ŝvebas spleno.
 Animoj duis. Nun mi solas.

Pro tio, ke li vin kultivis,
 Ekkaptis lerta per peniko,
 Okulkaresis, dum li vivis,
 Vin mi elektis por l' amiko.
 L' animduopo, ve ! disdrivis.
 Vi, diseriga, iĝu ligo.

Jam frostis frua dum aŭror'.
 Sub frosta mord', forvelkas flor',
 Mizeras koro en trabor'.

Sur tombo de l' amiko, florpalon neg' elpelas.
 Amika super tombo, novembraĵ blovoj veas.

S. BONIOL


ĜOJA MATENO

En firmament' fuĝas nuboj.
 En ĉia kor', facila ĝoj',
 Kaj piedoj, kiel buboj,
 Nun plimalpezas sur la voj'.

En aerbril' birdo pepas,
 Riveret' inter erikoj
 Saltas, kaj en ĉiel' strebas
 Tra nuboblank' blujaj pikoj.

Balancas sonorila hor'.
 Pasto bakiĝas por la pan',
 Fulmotondro jam kuris for
 Kaj ni survoje man' en man'.

Roparz Broudig
 elbretonigis Patriko.



Psikologo kaj Laboristino

Jozefo kaj Maria estis geedzoj. Li estis licenciulo pri psikologio ; ŝi simpla laboristino, eks-teksistino en fabriko Leto kaj K-io.

Spite tiun malsimilan intelektan kapablon, ili kunvivadis pace, eĉ feliĉe, ĉar ŝi zorgis kompetente ĉion koncernantan la hejmon kaj ŝi agis kompetente ankaŭ inter la litotukoj. (Ili uzis litotukojn rozkolorajn).

Tamen nia heroino, la menciita Maria, deziris demon(s)tri al la edzo, ke ankaŭ ŝi, simpla teksistino, scias regulojn por naskigi en li ĵaluzojn.

Nu, Maria eniris hejmen en tiu vespero kun rideto sur la lipoj kaj brilaj okuloj pensante pri la surprizo, kiun ŝi donos al la edzo.

- Jozefo - ŝi esprimis tuj post la eniro -, mi komunikas al vi, ke mi ĵus pasigis du plaĉajn horojn inter la brakojde mia amorato.

Jozefo rigardis al sia edzino rekte al la okuloj kaj gaje respondis :

- Ho, Maria! Vi igas min la plej feliĉa el la viroj! Mi amas vin tiamaniere, ke via feliĉo estas mia feliĉo!

La rideto, kiu estis sur la lipoj de Maria, malaperis kaj ŝiaj okuloj perdis brilon.

- Sed mi pensis... - ŝi komencis diri.

La edzo ne donis al ŝi la tempon por plu diri, ĉar li tranĉe aldonis :

- Maria, mi ne deziras, ke vi amoru sur lito de hotelo. Alportu ĉi tien vian amoraton... Morgaŭ mi estos ekster la hejmo la tutan tagon.

Maria ĵetis aĵon al la kapo de la edzo.

A. Lopez Luna

Venko super doloro

Mia spirito kreskiĝas..
 ... Kun ĝi ankaŭ mia koro.
 Mi pli bona hom' fariĝas,
 En mondo mi vidas nur gloron!
 Antaŭe mi sciis, kio dolor' estas,
 Tion mi timis renkonti.
 Kaj nun ? - Nun mi venkon festas
 Kaj pri ĝi al vi mi rakontis.

Remigiusz Grzela

- la venonta numero aperos fine de marto -

Ĝin ricevos nur la abonantoj por 1993. Kontrolu do, ĉu estas aŭ ne estas kruco en la cirklo malsupre de tiu ĉi paĝo. Se ne estas, dankon, via abono estas jam registrita. Se estas kruco, ni ankoraŭ NE ricevis vian reabonon.

Por reaboni : vidu la informojn sur la frontpaĝo. Vi povas aŭ ĝiri al nia poŝtkonto, aŭ al peranto el jena listo :

perantoj

Aŭstralio : Vlado KOSEF, 58 Green St., COBAR, NSW 2835

Brazilo : G. LEDON, Rua Maria Aparecida Anacleto 111, 04809 SAO PAULO
aŭ : Brazila Esperanto-Ligo, C.P. 11-1105, 70084 BRASILIA-DF

Baltaj landoj : V. BANIULAITIS, a.b.d. 16B, LIT - 5800 KLAJPEDA

Britio : Edward OCKEY, Longvida, 15 Upper Pines, Woodmansterne,
BANSTEAD, SM7 3PU

Bulgario : Gančo DAMJANOV, Makariopolski 7, 6100 KAZANLAK

Germanio : Manfred FUHRER, Am Stadtpfad 11, W-6236 ESCHBORN

Pagi al : Libera Esperanto-Asocio, Sonderkonto Bücherdienst
Poŝtĝiro Karlsruhe 2125 01-759, BLZ 660 100 75

Japanio : MINE Yositaka, Kitahama-Kitawaki 29-16, TAKASAGO-si,
Hyōgo-ken, 671 01

Pollando : 30.000 zlotoj al Leszek DOBROWOLSKI, str. Sowia 1/10,
59-300 LUBIN

Rusio : Georgij TUJAKIN, 33A-114, Kornejĉukstrato, RUS-127543 MOSKVO

Svedio : Pelle PERSSON, Svartviksvägen 14, 123 52 FARSTA

Usono : 20 us.dol. al ELNA, P.O.Box 1129, EL CERRITO, CA 94530.

Ĝenerale peras : SAT, 67 Av. Gambetta, F-75020 PARIS

kaj : UEA-sidejo, kie eblas pagi al la konto "ljpb-b", indikante ke temas pri abono al **Laŭte**.

La kruco signifas, ke ni petas vian reabonon.

Gérant & imprimeur : Baudé, F 47470 Beauville
CPPAP n° 58651